

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : FEBRUARO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE "KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO"

JARKOTIZO: 5 PESETOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: CARMÉ, 30 - BARCELONA

REDAKTOROJ

JAUME GRAU, ĈEF-REDAKTORO

S. ALBERICH JOFRÉ

ARTUR DOMÈNECH

ROMÀ GUARDIET

ĈIUN VENDOROJN, JE LA 10^a VESPERE, OKAZAS REDAKCIA KUNVENO.



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Sukceso

Ni ne nin vantos parolante pri sukceso. Nur ni ĝoje konstatos ke la reapero de KATALUNA ESPERANTISTO, sekvo de la vasta reorganizado de Kataluna Esperantista Federacio, vekis simpatian kaj entuziasmon ĉe multaj samideanoj enlandaj kaj eksterlandaj. Certe la nombro da aliĝintoj estas pli grava ol ni pensis kaj promeso pri helpo venis al ni de ĉiuj flankoj.

Tio montras kiel prava estis nia opinio ke por la revekiĝo de la enlanda movado sufiĉis komence la kuraĝo de fervoraj entreprenantoj.

Oni klare vidas ke tiu celo estas jam parte atingita kaj ke ni marŝas rapide sur la vojo al plena revigliĝo.

Nun estas necese por la tuta sukceso de tiu kuraĝa tasko, ke ĉiuj samideanoj forigu ian dubon aŭ malkonfidon pri la plena efektiviĝo de niaj deziroj kaj pretiĝu al tuja helpo varme kaj entuziasme.

Niaflanke restas plenumitaj ĉiuj promesoj kaj de la samideanoj dependas nun la sukceso; ili havos la plej bonan rimedon por ĝin akceli kaj pligrandigi, ne prokrastante la pagon de la Federacia kotizaĵo. La laboro farita estas promeso kaj garantio de la laboro farota.

Gratulojn ni ricevas por la reapero de K. E. kaj tio nin kuraĝigas al la realigo de niaj revoj; sed ni devas diri ke tiujn gratulojn meritas, antaŭ ol ni, la eminentaj pioniroj zorgintaj antaŭe pri nia kara gazeto, de kiuj ni klopodos imiti la trafan lertecon kaj samideanan fervoron. — J. G.

Gastigo de Austraj infanoj



GIAL ke dum tre longa tempo la presorgano de nia K. E. F. ne povis aperi, sendube multaj el niaj legantoj ne estas plene kaj ĝuste informitaj pri grava kaj konvinkiga apliko de Esperanto kiu, de la flanko de kelkaj sindonaj samideanoj enlandaj, estas entreprenita kaj parte jam kun sukceso efektivigita.

Pri tiu afero, de tempo al tempo, oni povis legi citaĵojn en la Barcelonaj ĵurnaloj, citaĵojn akompanatajn kelkafoje de bonvolaj laŭdoj; pli malofte de kritikoj kaj grumbloj. Ni aludas la alvenon de aŭstraj infanoj (el Stirio) kaj unuĵaran restadon en nia lando, bonfara verko kiun la hispanaj esperantistoj serioze ekprenis sur siajn ŝultrojn. En unu el la lastaj aperintaj numeroj de la «Bulteno de la K. E. F.» oni povis legi alvokon, cetere senditan ankaŭ al ĉiuj enlandaj esperantaj grupoj; tiu alvoko kiun subskribis la «Porinfana Helpkomitato» en Graz enhavis elokventan kaj kortuŝan pledon por helpi la mizeron de la orfaj kaj malriĉaj infanoj, rektaj, kvankam senkulpaĵ, viktimoj de la malbonoj el kiuj konsistas ĉiam la posttrenaĵo de milito. Tiu alvoko esperante redaktita, subskribita sole de aŭstraj samideanoj, estis, kiel ĉiu porhelpa pledo, tuj aŭskultita de niaj samideanoj; kaj tiel akorde kun ili formiĝis en Hispanujo Centra Komitato por helpado al aŭstraj infanoj, kiu sidis en Zaragoza, kaj kiu konsistis el ĉiuj enurbaj aŭtoritatoj preziditaj de tiu bonega samideano kaj bonkora viro, de ĉiuj katalunaj esperantistoj konata kiel afabla amiko, Sro. Emilio Gastón; veron ni diras kiam ni skribas ke al li persone oni ŝuldas ne malgravan parton de la efektivigo de tiu bonfara agado; krom tio en diversaj urboj kreiĝis ankaŭ lokaj komitatoj kiuj klopodis en siaj aranĝoj por la gastigo de la veturontaj infanoj; tiuj komitatoj estis kreitaj en Barcelono (S-ro. Serrat, prez.), Vic (S-ro. Comella), Terrassa (S-ro. Alavedra), Sabadell (S-ro. Uriach), Girona (Pastro Casanovas), Valencia, Gijón, kaj en aliaj urboj kiujn ni ne memoras en tiu ĉi momento.

La laboro kaj la malfacilaĵoj por la transporto de cirkaŭ 500 geinfanoj kaj por ilia gastigado en nia lando estis tre komplika kaj certe tro longa; grava sukceso estis ke la organizantoj povis atingi de la ŝipfirmo Tayà ke tiu transportos senpage la infanojn de la haveno Genovo ĝis Barcelono.

Kiam ĉiuj preparoj estis jam finitaj oni zorgis jam pri la unua sendo kiu konsistis el 25 geinfanoj, akompanataj de Sino. Hackl kaj S-ro. Bartel, sekretario de la Komitato en Graz; ili enŝipiĝis en Genovo en la lastaj tagoj de Septembro 1920.^a kaj alvenis post nelonge en Barcelono. Simpla kaj solena, vere kortuŝa estis tiu alveno; sur la kajo atendis reprezentantoj de la Barcelonaj aŭtoritatoj, membroj de la Centra Komitato kaj multaj samideanoj, kiuj malgraŭ la necerteco de la elŝipiĝo avidis saluti la malfeliĉajn infanojn, en la unua momento ektuŝi la hispanan landon. Kiam la ŝipo alprok-

simiĝis, esperantaj flagoj vidiĝis ondigantaj kaj ĉe albordiĝo la esperanta himno eksonis sur la ŝipo kaj kuniĝis la kanto kun tiu emocia de la samideanoj atendantaj; salutoj, aplaŭdoj, kortuŝaj, bonakceptaj vortoj sekvis unu la alian kaj multaj konservos el tiuj momentoj la nostalgion de emocia ĝuo. El tiu unua ekspedicio kelkaj infanoj restis en Barcelono, la plej multaj veturis al Terrassa kie ili estis ankaŭ tiel bonkore kaj afable atenditaj, kaj ĝis hodiaŭ kaj por longa tempo ankoraŭ bonfare kaj familie gastigitaj.

Post ok tagoj alvenis Barcelonon nova ekspedicio kun ankaŭ 25 geinfanoj, kiuj estis senditaj al Zaragoza, kie oni gastigos ilin; en la vojaĝo ili estis bonvene salutataj de siaj memlandaj kunuloj en Sabadell kaj en Terrassa; en Manresa, kie la vagonaro haltas pli longan tempon, la urbestro kaj altrangaj personoj regalis la geinfanojn per agrabla kaj abunda vespermanĝo kaj la morgaŭon matene ili atingis la urbon de sia restado, kie oni de tiom longe ilin atendis senpacience.

Post dek-kvin tagoj alveturis tria ekspedicio, el kiuj unu parto veturis Valencion kaj alia al Terrassa; kaj la 19.^{an} de Novembro, kvara ekspedicio al kiu sendube, kiam tiu ĉi raporto aperos, estos sekvintaj la ceteraj kaj la tuta nombro de gastigitaj infanoj estos jam transveturigita en nian landon.

Multaj el tiuj infanoj konas iom da Esperanto, kaj eĉ kelkaj parolas ĝin sufiĉe flue kaj komprenas tre bone ĉion kion oni diras al ili; domaĝe ke la tempo por pretigado estis tro rapida kaj oni ne povis atingi de ĉiuj pli kompletan konon de nia internacia lingvo.

Ni ne plenumus nian devon se ni ne esprimus ĉi tie nian varman dankon al la organizantoj de tiu bonfara agado, kiu tiel honorigas ilin; ili montriĝis certe bonegaj esperantistoj; ili ne estas el tiuj kiuj teorie disludas la belecon de Esperanto, kaj papage kantas laŭdojn al ĝi, sed el tiuj kiuj praktike kaj pli taŭge laboras por ĝia disvastigo.

Kiam tiuj malfeliĉaj infanoj, en niaj enlandaj hejmoj gastigitaj, revenos al sia lando, ili certe rememoros ke al la homama sento de la esperantistoj ili precipe ŝuldas sian nunan bonstaton; kaj ili montriĝos dankaj kaj indaj de la ricevita favoro se ili tiel pensos kaj diros al siaj kunlandanoj.

Ne mankiĝas, kompreneble, en tiu ĉi agado la nebonvola komentario de tiuj personoj kiuj en la elmonro de sia amo al la nacio, kaŝas plej ofte sian propran egoismon kaj sian nulan bonfaremon kaj ili kuŝiĝis plendi ke la esperantistoj zorgas pri fremdaj infanoj: Kvazaŭ ni devus forgesi ke ĉiuj esperantistoj, al kiu ajn lando ili apartenas, devas senti sin fratoj kaj kvazaŭ malatenti ke en ĉiu suferanto ni devas vidi nian kunpatrujanon. Feliĉe, tiu estis la sento de tre malmulta nombro da personoj, kaj la plejmulto volis montri ke ili kunsentas kun ni kaj samtempe esprimi sian simpatian al tiuj karaj infanoj, akceptante ilin kun granda ĝojo kaj multnombro sin proponante por ilia gastigo.

Al amiko

Sub ombro freŝa de maljuna arbo,
 sidante tere sur l' abunda herbo,
 tie mi volus apud mi vin vidi,
 amiko mia.

Tie, mizerojn mondajn forgesante
 kiuj lacigas kaj tro frue lasas
 blanka la kapon, pri l' nuntempo gaja
 ni nur parolus;

pri, ĉu la nuboj super mont' starantaj
 kaj trairantaj en ĉielo blua,
 alportas pluvon al la ter' amika
 aŭ sole varmon;

pri la trunkaroj de vinberoj nigraj
 kiujn rigardas kamparan', pensante
 kiam li premos ilin per piedoj
 purpuriĝintaj;

pri hund' fidela, apud ni kuŝanta,
 pri l' vent' movanta kanojn malkvietajn...
 Poste tra la vojet' veni ni vidus
 belan knabinon

kun kruĉo plena je kristala akvo;
 kaj, je la peto nia por ĝin trinki,
 ruĝkoloritaj ŝiaj dikaj vangoj,
 «Trinku» ŝi dirus.

JOAN MARAGALL

El kataluna lingvo tradukis

JAUME GRAU

La Barcelona brokantejo



VASTIĜAS la Barcelona brokantejo tra la ĉirkaŭaĵoj de la Vendejo de Sankta Antonio, lokitaj la nefiksaj barakoj ĉe la angulo de grandaj muroj el fero; ĝi daŭras tra la ampleksaj kaj kotaj trotuaroj de la strato Urgell, montritaj la vendotaj komercaĵoj sur la malseka tero, kaj formas ĉe la angulo de la Ronds-tratoj rondon de kompaktaĵ kaj pentrindaj barakoj, sub la arboj de branĉoj maldikaj kaj plenaj de terkoloraj buloj, kiel paroj da birdoj tremantaj pro la frumatena malvarmo.

La dimanĉojn matene, kiam alvenas la tramoj plenaj de laboristoj irantaj al la urbo por fari siajn aĉetojn kaj amuziĝi; kiam la granda vendejo forĵetas el siaj grandaj buŝoj la servistinojn, kun la korboj tutplenaj kvazaŭ kornoj de la abundeco; kiam la stratoj Carme kaj Hospital estas du-riveroj versaŭntaj la popolamason en la foiron, estas belega spektaklo tiu abelejo sub la fajro de brilega suno: la iroj kaj revenoj kaj haltoj antaŭ la improvizitaj butikoj de ruinaĵoj; kaj prezentas la plej strangan kontraston tiu popolamaso festotage vestita, inter tiuj malriĉaĵoj kaj restaĵoj ĵetitaj teren per la plej hazarda nekohereco.

Neniel similas tiu ĉi foiro la festaĵn foirojn. En tiuj, kiu iras aĉeti iras tien por plenumi deziron: en tiu ĉi estas la mizero kiu vokas la malfeliĉajn. Tien oni iras por nove sin ornami: ĉi tien por sin vesti de malnovaĵoj. Tien oni iras kun la deziro ornamo la korpon: ĉi tien kun la urĝa bezono kaŝi ĝin je la malagrabla vetero. En tiuj oni vendas iluziojn, kaj en ĉi tiu malrevaĵojn. La vendistoj ne laŭdas la artiklojn per krioj kiel en tiuj, kie ili devas batali kontraŭ la kaprico: ĉi tie ili antaŭscias ke estas la mizero kiu helpas la vendadon, kaj ili atendas kuŝantaj kaj dormemaj ke la malfeliĉo alportu aĉetantojn al ili.

Ne estas necese demandi kion ili serĉas kaj deziras alproksimiĝinte al la barako. Nudpiedaĵ ili prezentigas se ili bezonas ŝuojn; tremantaj de malvarmo se ili bezonas surtuton; sen io sur la kapo se ili bezonas ĉapon; kaj tie, el tio multa kaj malbona kion la mizero amasigas, ili ne elektas tion kio pli ornamas, sed kio pli varmigas, kaj ili trovas, en tiu mortintejo de objektoj, malriĉajn vestaĵojn aranĝitajn kaj rebonigitajn por ne morti de malvarmo kaj daŭrigi la vivon.

Tien fine venas tio kion ĵetis la mondo pro malsato aŭ enuo, kion donis la malsato garantie ĉe la pruntedonistoj de mono, kion elverŝis la lukso kaj malsatis la troa riĉeco. Ĉiuj kompatindaj restaĵoj kiujn la morto lasis sur la tero, ĉiuj rememoraĵoj forlasitaj de la tempo per la malvarmo de tuta forgeso, tien alvenas fine; tie ili kuŝas sen varmo sur la trotuaroj, dum la suno kun bela senkonscio lumigas ilin, igante tiun mizeran scenon brila kolo-

rigita scenejo, kie la ĉiela lumo, la vibrado de la atmosfero kaj la matena venteto invitas la homon al la vivo, al la forgeso de la doloroj kaj al la ĝuo de la bonaĵoj de la tero.

Tie, meze de malnovaĵoj, ofte oni trovas ion antikvan; kaj ĉiuj el ni kiuj sentas la amon por la restaĵoj de la estinteco; kiuj aŭskultas atente la parolon de la rememoro kun obstina fido; kiuj flaras en tiuj mizeraj amasoj ion rakontantan al ni alitempajn sentojn, ĵkiom da emociaj historioj ni povis diveni ĉe tiuj aroj da ruinaĵoj!

Ĉio rememorigas tie ion estintan kaj neniigitan; ĉiu ero konservas en sia ŝvitplena surfaco la premon de amika mano, la sigelon de iu iluzio aŭ la unĝobaton de la elreviĝo; la froto de la vivo tremas en tiuj mizeraj restaĵoj, ankoraŭ varmetaj kaj korbataj; en muta, malgaja kvieto ili gardas sekretojn kies atestantoj ili estis; kaj ili aspektas hontemaj sin vidi senvestaj kaj mizeraj, antaŭ la ridetanta ĉielo kaj sub la okuloj de tiu mondo da scivolemuloj, kiuj ilin rigardadas avide.

SANTIAGO RUSIÑOL

El kataluna lingvo tradukis

RAMÓN PRADA



Arpeĝo

En la fundo de l' mar' naskiĝis perlo,
 Sur alta rok' la blua violet',
 En la nuboj el roso la guteto,
 Kaj vi en mia rev'.

Mortis la perl' en imperia krono,
 En bela vaz' velkinta la viol',
 En brilantaj vaporoj la rosguto,
 Kaj mi en via kor'.

EUSEBIO BLASCO

El hispana lingvo tradukis

VICENTE INGLADA

Grava sukceso de K. E. F. en nia II^a Specimena Foiro



ERTE niaj federacioj kaj niaj legantoj kontentigos pro la grava sukceso kiun nia K. E. F. atingis.

En alia parto la Redakcio de K. E. jam anoncas la feliĉan sukceson kaj novan vekigon de nia kara Federacio. Ni jam ricevis kontentigan kvanton da novaj aliĝoj kaj ni esperas baldaŭ ricevi aliajn de tiuj skeptikuloj kiuj ankorau ne enviciĝis. La vizitoj de ni faritaj estas por ni la plej valora elmonro ke nia samideanaro nur dormis kaj ke ĝi nur bezonis la veksinalon por denove laboradi; ni esperas ke la farotaj vizitoj ankaŭ donos al nia Federacio bonajn fruktojn.

Okaze de nia 1.^a Oficiala Specimena Foiro, kelkaj Barcelonaj Grupoj petis al ĝia Organiza Komitato ke nia lingvo estu enkalculata en la lingvoj pere de kiuj ili intencis propagandi la Foiro. Bedaŭrinde kaj eble ĉar la Grupoj ne reprezentis ian komunan nek fortan organizaĵon, ilia peto restis neaŭskultita.

Spite tiu antaŭa neo, mi vizitis en la nomo de K. E. F. la Komitato kiu nun jam laboras por la organizado de nia II.^a Oficiala Specimena Foiro, baldaŭ okazonta, kaj certe ni atingis gravan venkon.

La citita Komitato plene akceptis Esperanton. Oni eldonos cirkulerojn, anoncetojn, grandajn murafiŝojn kaj ankaŭ, oni korespondos Esperante.

Kaj ne nur ni atingis tion kio per si mem jam estus grava sukceso, ni atingis ke en ĉiu dokumento, letero, k. t. p., kiujn la Komitato de la Foiro alsendos ĉu respondante peton, ĉu proponante helpon, oni enmetos folieton kie estos presitaj la plej citindaj venkoj de Esperanto de la komerca vidpunkto.

Por ke niaj amikoj povu kalkuli la gravecon de la propagando kiun ni faros pere de tiuj folietoj, ni povas diri ke dum la organizado de nia 1.^a Foiro, estis senditaj pli ol 5000 leteroj kaj propagandaj cirkuleroj kaj la organizantoj de la II.^a esperas ke en la nuna tiu nombro plialtiĝos ĝis 10000.

Pri la enhavo de tiuj propagandiloj kaj elspezoj de la presado zorgos la K. E. F.; kaj pro la rekomendo farita de la foira Komitato ili estas kastillingve verkitaj, ĉar precipe la propagando estas farata inter la hispanoj kaj hispanlingvanoj el Ameriko, tial ke la foiro estas nur nacia elmonro de niaj produktaĵoj.

Se kiam tiu ĉi numero de K. E. aperos la presisto jam finis la presadon de tiuj folietoj, ni kunsendos ekzempleron al ĉiuj legantoj por ke ili mem konstatu la gravecon de tia propagando kaj vidu kiel vere ni diris ke ni estas atingintaj gravan sukceson.

JOAN GILI NORTA



ENLANDA MOVADO

Ni denove kaj tre insiste petas la Grupojn bonvolu sendi al ni raportejojn pri interesaj aferoj kiujn ni publikigos sur paĝoj de Kataluna Esperantisto.

GIRONA.—La 12.^{an} de Decembro vizitis tiun urbon kelkaj anoj de la Direkta Komitato de K. E. F., por okazigi propagandan feston kaj proponi al la Grupo «Ĝerona Espero» la organizon de la venonta IX.^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio.

Matene ili estis akompanataj de samideanoj Pastro Casanovas, Doménech kaj Peris, kiuj montris al ili la mirindaĵn antikvaĵojn de la urbo. Ankaŭ estis vizitataj kelkaj Societoj kaj festosalonoj.

Je la 4.^a posttagmeze, en la sidejo de la Grupo, ĉe la Komerca Ĉambro, okazis la propaganda festo ĉeestata de multaj personoj, inter ili kelkaj urbaj eminentuloj.

Post afabla prezento farita de Pastro Casanovas, Prezidanto de la Grupo, paroladis kun entuziasmo S-roj. Grau kaj Gili rilate la nunan vekigon de nia kara movado en la tuta mondo kaj ĉefe en nia lando, kie ĝi estis jam atinginta specialan gravecon.

Estis proponata al la aŭskultantaro la okazigo en Girona de la venonta Kataluna kongreso kaj varma aplaudado kaj aprob-signo respondis tiun proponon.

Parolis fine Pastro Casanovas dirante ke la Grupo studos ĝin detale kaj komunikos oportune la tute eble favoran decidon.

Amaso da urbaj samideanoj akompanis la vizitintojn al la stacidomo, kie oni sin adiaŭis aklamante Esperanton kaj la Ĝeronan Kongreson.

Dum la kompostado de la nuna numero alvenis la sciigo ke la propono okazigi en Girona la venontan Kongreson estas entuziasme akceptata. Okazos nova vizito por detale pritrakti la aferon kaj en la venonta monato ni sciigos niajn legantojn pri nia IX.^a Kongreso.

TERRASSA.—En la Grupo «Lumon», la nokton 24.^{an} de Decembro, okazis intima kaj tre ĉarma festo de la Kristnaskarbo, kiu estis dediĉata al la aŭstraj geinfanoj gastigataj en la urbo kaj honorigata per la ĉeesto de la urbestro, kiu venis saluti ilin. Agrabligis la feston kantado kaj legado de poeziaĵoj kaj oni regalis la geinfanojn diversmaniere.

MANRESA.—Antaŭ nelonge faris propagandan paroladon en tiu urbo nia klera samideano S-ro. Albagés, el kiu rezultis aranĝo de esperanta kurso gvidita de li mem, kun ĉeesto de multaj novaj samideanoj. Ili rapide fervoriĝis kaj baldaŭ estos fondita nova Grupo, per kiu certe Esperanto enradikiĝos en la Manresa urbo.

BARCELONA.—La grava kaj tre konata Barcelona societo «Paco kaj Amo» sciigis oficiale sian aliĝon al Kataluna Esperantista Federacio. Per tio ĝi oferas sian efikan helpon al la Federacia organizaĵo, kiu multe ŝatas kaj estimas la fervoron kaj agemon de la nova aliĝinta societo.

—En ĝia sidejo, la 16.^{an} de Januaro, S-ro. Delfi Dalmau esperante paroladis pri «la plej efika metodo lerni kaj lernigi Esperanton». Superflue laŭdi la stilon kaj belecon de parolado de nia amiko Dalmau kiu kun granda sukceso evidentigis trafan metodon por instrui nian lingvon.

—En «Círculo de la Mujer del Porvenir», en kies interno Pa-

co kaj Amo malfermis kurson, S-ro. Dálmau ankaŭ paroladis pri nia movado kaj ĝiaj rilatoj kun feminismo.

—La Grupo «Barcelona Stelo» aranĝis por la 27.^{an} de Januaro ekzamenon pri Esperanto, kiun partoprenis la gelernantoj de la Grupo, kun vere sukcesa rezultato.

La 7.^{an} Februaro komenciĝos novaj unuagrada kaj duagrada kursoj de Esperanto.

EKSTERLANDA MOVADO

En nia unua numero ni sciigis niajn legantojn pri ia propono, de Japanujo al la Ligo de Nacioj, favora al Esperanto. La telegramon, el kiu ni elĉerpis la sensacian novaĵon, du tagojn poste, alia telegramo diris malvera. Tamen novajn gravajn okazintaĵojn ni devas raporti pri tiu ĉi sama afero.

NIA LINGVO ESTIS OFICIALE PRIPAROLATA ĉe la unua kunsido de la Ligo de Nacioj. Dekunu delegitoj prezentis la jenan tekston de rezolucio, kiu estis presigita kiel dokumento nro. 194 de la kunsido:

«La Ligo de Nacioj, konstatante la lingvajn malfacilaĵojn, kiuj malhelpas rektajn rilatojn inter la popoloj kaj la urĝan necesecon forigi tiun baron por helpi al bona komprenigado inter nacioj,

Sekvas kun intereso la provojn je oficiala instruado de la internacia lingvo Esperanto en la publikaj lernejoj de kelkaj regnoj, anoj de la Ligo de Nacioj,

Esperas ke tiu instruado ĝeneraliĝos en la tuta mondo, por ke ĉiulandaj geknaboj sciu de nun almenaŭ du lingvojn, sian gepatran kaj facilan rimedon por internacia komunikado,

petas la ĝeneralan Sekretariaron, prepari por la venonta kunsido, detalan raporton pri la rezultatoj atingitaj en tiu fako».

Laŭ decido de la kunveno, tiu rezolucio estis pristudata de a komisiono nro. 2 (teknikaj aferoj) kiu, la 18.^{an} Decembro ĉe la lasta ĝenerala kunsido, prezentis tre favoran raporton rekomendante oficialan enketon pri la instruado de Esperanto. Bedaŭrinde pro la forta kontraŭstaro de la franca delegitaro kiu petis por la franca lingvo la internaciecan rajton, oni prokrastis la aferon

Ni tamen esperu ankoraŭ; la afero ne estas finita.

—En Polujo estas rimarkinda la disvastigado de nia ideo. Jen estas konvinkaj sciigoj: en Lodz la esperantistoj preterpasas jam la nombron 5000; en Bromberg-Bydgoszcz preskaŭ ĉiuj urbaj gazetoj skribas ofte pri Esperanto, kio estas vera signo pri la graveco de la Esperanta movado en tiu urbo; en Krakow la Komerca Ĉambro alprenis Esperanton por la eksterlanda korespondado; en Warszawa estas vicministro de la Saneco, nia fervora samideano S-ro. Alfons Wierzbieta; en Siedlce, en Czeslohova kaj en aliaj polaj urboj, sukcesajn kursojn, konferencojn, ĉiuspecajn propagandajn entreprenojn organizas la laboremuloj kun kontentiga rezultato.

La 18.^{an} Novembro, alveturis Varsovion hungara delegacio, en kiu troviĝis prelato Aleksandro Giesswein, malnova esperantisto. Por honori tiun eminentan gaston, estis kunvokita kunveno kiun ĉeestis S-ino. Zamenhof kaj D-ro. Leono Zamenhof kiu faris la akceptparoladon, responditan de la ŝtata gasto per transdono de saluto de la hungaraj samideanoj.

—Nuntempe en Britujo la movado estas ĝenerale tre vigla. Kunvenoj, kursoj, konferencoj, festoj okazis en Bath, Barry, Bedford, Birmingham, Brighton, Colne, Dunfermline, Edinburgh, Glasgow, Hastings, Southport, Leeds, Leith, Letchworth, Liverpool, Manchester, Newcastle, Portsmouth, Sheffield, k. t. p.

—En Ĉeĥoslovakujo nia afero atingas plej altajn suprojn. La ŝtata fervoja direkto eldonis cirkuleron en Esperanto instigantan la fervojistojn lerni nian lingvon por la okazonta kongreso, kiu esperinde kaŭzos konsiderindan trafikon de fremlandanoj. La tutan aferon gvidas S-ro. Rebiček, fervojkonsilanto. Esperantaj kursoj jam komenciĝis en kelkaj grandaj stacidomoj, nome: Frijdek-Mistek, Prerov, M. Ostrava, Uh. Hradiste, kaj aliaj.

La XIII.^a Kongresa loka komitato en Praha energie kaj vigle laboradas.

—En Germanujo, la straro de la bankoficistoj de Wilhemshaven-Rüstringen rekomendas la eklernon de Esperanto. Multaj kursoj estas organizitaj en ĉiuj landpartoj, interalie en: Ane, Berlin, Braunschweig, Breslau, Deuben, Dobritz, Frankfurt, Hof, Koblenz, Leipzig, Mörs, München, Pforzheim, Radebeul, Stolberg, k. t. p. Fondiĝis novaj grupoj en Burgstädt, Harburg, Koblenz kaj Trebnitz.

XIII^a Universala Kongreso de Esperanto 1921 en Praha-Ĉeĥoslovakujo

Gesamideanoj!

Laŭ la decido de la XIIa en Haag la XIIIa Universala Kongreso de Esperanto okazos en aŭgusto 1921 en Praha.

Ĉeĥoslovakaj geesperantistoj ĝoje salutante tiun ĉi decidon plezurege faros ĉion eblan por la plena sukceso de la manifestacio de Esperanto en la Ĉeĥoslovaka respubliko.

La ĵus konstituiĝinta loka komitato jam komencis siajn preparajn laborojn, esperante ke ĝi trovos kunhelpon de la tutmonda esperantistaro por povi brile plenumi sian grandan honoran taskon.

Ni petas ĉiujn niajn geamikojn jam de nun fari ĉion necesan, por povi partopreni la XIIIan, kaj instigi la aliajn por kunesti. Disvastigu la konon pri la naturaj belaĵoj de nia venonta kongresurbo Praha kaj Ĉeĥoslovakujo, kie la esperantista movado estas de lonke tiel vigla.

Invitante Vin sincere en la belegan historian ĉefurbon de nia renovigita ŝtato ni esperas ke Vi grandnombre partoprenos la kongreson kaj estos kontentigitaj per nia laboro.

Ĝis la revido en Praha! — *Loka kongresa komitato.*

U N U A K O M U N I K O .

La 29an de septembro 1920 en la komitata kunveno de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio, Esperantista klubo kaj Rondeto de Esperantistinoj oni elektis jenan *lokan porkongresan komitaton* :

Prezidanto : Eiselt, eksgimnaziestro; vicprez. : 1. Kraus, magistrata oficestro; 2. F-ino Ŝupichová, instruistino; ĝenerala sekretario : Pitlík, komercministeria komisario; sekretarino : F-ino Dlouhá, oficistino de ŝtataj fervojoj; kasisto : Novák, horloĝisto. Por la «Verda Stelo» estis elektita Mudr. Bischitzky.

Sekciestroj : 1. Financa : Hromada, oficisto; 2. propaganda : Bouška, urba oficisto; 3. presa : Weiner, redaktoro; 4. loĝiga : F-ino Moudrá, instruistino; 5. por distraĵoj : F-ino Hlaváčová, instruistino; 6. aranga : Lukáš, studento de la universitato. Revizoroj : D-ro Kohout, landa ĉefkonsilanto kaj Vondruška, landa revizoro.

Ĉiun korespondadon kaj aliĝojn oni sendu (por respondo respondkuponon aŭ afrankon en naciaj poŝtmarkoj) al : *Augustin Pitlík, Praha III. — Nerudova ul. 40.*

Ni petas la samideanojn ke, por faciligi nian taskon, ili pagu sian kotizaĵon tuj post la ricevo de la nuna numero.

Ni kredas ke la sola reapero de «Kataluna Esperantisto» konvinkos ĉiujn pri la nova kaj longedaŭra vivo de nia Federacio kaj tial ili ne volos malhelpi ĝin.

En Barcelono ni prezentos la kvitancojn en la hejmo de niaj subtenantoj.

En la ceteraj lokoj zorgos pri tio niaj delegitoj, sed se ni ne sukcesas aranĝi tuj tiun aferon, ni dankos ke ĉiu sendu aparte la kotizon.

Se ĉiuj kunhelpas, la normala funkciado de K. E. F. kaj la regula aporado de K. E. estas jam de nun certigataj.

II^A OFICIALA FOIRO DE SPECIMENOJ BARCELONA



20 - 30 APRILO 1921

La sukceso de la 1.^a Foiro de Specimenoj, kiu okazis en Barcelona la pasintan aŭtunon, aŭguras al la Foiro de Printempo certan prosperon tiel rilate al la multenombro da aliĝintaj Firmoj, kiel rilate al la amaso da aĉetistoj, kiuj en ĝi sin donos rendevuon.

Vin turnu por la vojaĝo al nia Agento : COOK SONS & C.^o

Vin turnu por ĉiu informo al la Foira Oficejo :

PLAZA DE ANTONIO LÓPEZ, 15
APARTADO DE CORREOS, 769
BARCELONA

TELEGRAFA ADRESO : "FERIA - BARCELONA"

TELEGRAFAJ KODOJ :

A. B. C., 5.^a ELDONO - BENTLEY'S
WESTERN UNION - MARCONI INT. CODE